


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

ĜIRONUMERO
209354 NEDERL.

JARABONO :
NEDERLANDO :
0,80 GULDENO

ALIAJ LANDOJ :
16 Fr. Fr. ; 0,70 Dol. ; 2,1 Sv. Fr.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

El „BARTJE” de Anne de Vries.

La patro ĉiam diras, ke tago daŭras tede longe, sed pri tio Bartje ne samopinias kun li.

Bartje neniam enuas. La kaŭzo de tio estas kompreneble, ke li — precipe dum somere — estas tiom ege okupita.

Jen, unualoke, la fosaĵo kun la skaraboj, la dornfiŝetoj, la ranoj kaj la akvoratoj, kaj mondo plena je mistero inter la akvoplantoj. Imagu, ke naĝas rato tra tiu longfoso aŭ ezoko senmove staras en la akvo, kaj vi ne estus paŭcelinta ilin per ŝtono, tio estus ja vera domaĝo! Nu, jen estas plue la nekulturitaj framboj sur la randoj de la kverkarbaro inter la kampoj. Nun ili floras ankoraŭ, sed oni tamen jam bezonas kontroli ilin ĉiutage por povi tuj deŝiri la ruĝajn, antaŭ ol niaj fratoj ekrimarkas ilin. Kaj jen la ĝardeneto kaj la kunikloj sur herbobedo. Kaj, paŝtiĝinte longe sur la sama kampoparto, la blanka kaprino sendube ja ŝatas ekhavi freŝan lokon sur la herbejo. Kaj ĉiuj birdonestoj, kiujn li scias. Kaj du fojojn en ĉiu semajno la petrolvendisto venas kun sia odoraĉanta ĉaro. Nu, jam sufiĉas!

Kaj krome restas al li kiel rezervo tre multe da plenkreskuloj, kiujn li povas viziti. Sed pli bone estas, se oni ne bezonas ilin, ĉar nur malmultaj el tiuj plenkreskuloj estas fidindaj. Jen estas ekzemple la patro — li ja estas la plej bona el ĉiuj — kaj tiu punbatas vian postaĵon, ĉar vi estas la plej aĝa, kaj tiucele li eĉ devigas vin iri mem por preni la vestbatilon de la subtegmento. Panjo vin vokas atablamiene kaj kiam vi staras apud ŝi, evidentiĝas nur, ke vi faris ion malpermesitan, kaj ŝi tordas vian oreilon. La ĉar-

pentisto kaj liaj servistoj kovras vin per rabotaĵoj kaj tiam ili havas grandan plezuron. Unu farmisto vagigas vin longtempe por preni sentruan paton kun truoj, kaj alia irigas vin preni fadenon kun kudrilo por fermkudri la sangoplenan truon en la gorĝo de ĵus buĉita porko. Plenkreskuloj, precipe se ili ne estas solaj, volonte faras sian eblon por igi ridindaj malgrandajn knabojn. Nur se ili estas tre okupitaj, ili krias, aŭ forpelas vin. Tial Bartje preferas resti sola. Li pli ŝatas la skarabojn, la kaprinon kaj la akvoratojn. Kaj kelkfoje li iras al Hendek-Jan, la ŝtelĉasisto. Tiu ĉiam estas sola kaj pro tio ne tiel danĝera. Kaj tiu, ĝuste dirite, samopinias kun Bartje : ankaŭ li ne tro fidas la homojn.

Hodiaŭ Bartje laŭ kutimo komencas la tagon ĉe la foso. Li aperigas botelon el sia zorge kaŝita trezorejo troviĝanta sub la fojno en la tenejo, grimpetas laŭ la foscordo malsupren kaj tombe silenta, kaŭrante, li spionadas la dornfiŝetojn. Liaj lignoŝuoj sin suĉas malrapide en la malbonodoran ŝlimon, sed li ne rimarkas tion. Li kliniĝas super la bruna akvo kaj rigardas. Li tute perdiĝas en la rigardado de la malgranda peco de l' mondo ĉe siaj piedoj... Malgranda skarabo kun oraj piedoj grimpas inter haoso de tigoj tra preskaŭ nepenetrebla arbaro al certa celo, ie en la mistera profundo. Heliko, tuj apud la bordo de la foso, rampas el sia konko kaj palpante movas sian kapon ĉirkaŭe... Jen la kolomboj denove preterflugas. Kaj rapide sin turnante, du dornfiŝetoj — unu griza kaj post ĝi alia, kiu estas brile kolora — ekĵetas sin antaŭen tra la arbaro kaj persekutas unu la alian ĝis antaŭ paro da lignoŝuoj.

Bartje ekkaptas — lia pugno disrompas la kreskaĵojn — sed la tiŝetoj sin savis.

„Tre domaĝe,” ĝemdiras Bartje, kaj tiam li vekiga. Lia kapo turniĝas kaj li sin tenas per herbtufo. Super la akvon falas ombro, kaj sur la ponteto staras panjo kun suprenfalditaj manikoj kaj ŝvitkovrita vizaĝo.

„Malbonulo, ĉu oni devas denove subakvigi vian kapon?”

Tion ŝi faris foje. Neatendite, ŝi kaptis liajn kruojn kaj plaŭdigis lian kapon multfoje en la akvon, kiel la batilon en la buterigilon... Por dekutimigi al li la ludadon kaj ŝlim-vadadon ĉe la foso. Tio estis terure sufoka, kaj ankoraŭ vespere en la lito, li fingroskrapis la ŝlimon el siaj oreloj. La patrino kapablas tion refari en tago kiel hodiaŭ. Tial Bartje sin levas rapide.

„Ne, panjo, ne necesas.”

Kun granda peno li tir-liberigas la lignoŝuojn. Tio kaŭzas suĉkisbruadon. Liaj kruroj estas rigidaj kaj doloras.

„Venu ĉi tien.”

„Jes, panjo.”

Li venas. Li purigas rapide la lignoŝuojn sur la herbo kaj la manojn sur la posto de sia pantalono. Plue li restas ekster la kaptopovo de la ruĝaj patrinaj manoj. Malfide kaj sekrete li rigardas ŝian vizaĝon. Inter la kutimaj zorgosulkoj li rimarkas ian ruzon sur ŝia vizaĝo. Li staras preta por ekforsalti.

„Kuniru hejmen.”

Sur la mallarĝa brikvojeteto ŝi jam iras antaŭen en siaj eluzitaj lignoŝuoj. Bartje sekvas. „Oni nun nepre atentu,” li pensas. „Certe ne okazos multe da bono. Alie, ŝi tuj estus dirinta tion kio estas...”

Sed hejme, ĉio estas ordinara. En la ŝranklito la infano ankoraŭ ploretas tede. Sub ĉi tio la dika Jan etendas sian kapon el la kelo : „Panjo, ĉu nun sufiĉas?” Araneaĵo gluiĝas en liaj haroj. Malpuraj strekmakuloj montriĝas sur lia malinteligenta vizaĝo. Po du fojoj en ĉiu semajno, li devas renversi la terpomojn, kiujn oni konservas sub la ŝranklitoj; ĉar dum la printempo ili tiel ege ĝermas. La patrino ne respondas al li. Ŝi brue furiozas kontraŭ Geertje, kiu surŝutas malgrandajn figurojn sur renversitan piedvarmigilon per la cindro de ties fajropoto. Riekie pilkludas per du terpomoj kontraŭ la pordon de la ŝrankolito. Kaj sur la tablo...

Sur la tablo kuŝas aro da brunaj faboj, sulkoplenaj, ŝvelintaj kaj moliĝintaj brunaj faboj.

„Elserĉu ilin nur bone,” diras la patrino. En ŝia voĉo oni aŭdas trompe-kaŝitan rideton. „Kaj vi estos vigla knabo! Estas nigraj inter ili.”

Li tamen tiel ege teruriĝis, ke li ruĝiĝas ĝis en sia blanka hartufeto. Li fiksrigardas senespere al la fab-amaso. Ili jam estas moligitaj kaj oni manĝos ilin hodiaŭ je tagmezo.

„Fi!” li diras mallaŭte. Li ne rajtas diri tion. Sed brunaj faboj estas tiom ege naŭzaj. Estas la plej naŭza manĝaĵo, kiu ekzistas. Bartje ne scias la kaŭzon de tio, sed li jam naŭziĝas ĉe la penso, ke li estos devigata maĉi kaj tragluti la unuan, malfacile disigeblan plenbuŝon da ili. Jam nun li glutas kontraŭ tio.

„Ĉu ni manĝos hodiaŭ tagmeze brunajn fabojn?” per stranga, senespera voĉo li krias.

„Jes,” diras Riekie, kaj daŭrigas la pilkludadon. Jan kantas arion kaj sub la ŝranklito li ĵetegas per terpomoj. Patrino iris for. Bartje tute ne rimarkis tion. „Fi,” li diras laŭte, kaj piedfrapas dume la plankon. Jen ŝi mistifikis lin! Estas li, kiu laŭ ŝia plaĉo antaŭe devas elserĉi la fabojn, pro kiuj li preskaŭ sufokiĝos tagmeze. Ankaŭ, li devis alporti la vestbatilon per kiu oni poste punfrapis la postajojn. Tio estas la samo. Sed li ne rezignacios pri tio. Nepre li trovu rimedon por solvi tiun problemon.

Ekkrakas la kelpordo. Nimple, la griza kato, sin tordas tra fendó, lekas la buŝon, tramarŝas la ĉambron kaj iras sur la fenestrobreton por lavi sin.

Bartje malsupreniras la kelŝtupareton.

„Kion vi serĉas tie?” demandas Riekie.

„Demandema knabinaĉo. Kaj ke vi nur fermadu la bekon!” kolere minacas Bartje.

En la malluma kelo li ekzamenas palpante la enhavon de pladoj kaj tasoj. Tie... grasaĵo — tie... lakto, de kiu la tiea kataĉo sin trinkis preskaŭ malsana, tie... peceto da lardo en krakpapero. Li piede batas kontraŭ malgranda kaserolo. Li kliniĝas kaj palpas interne de ĝi. Estas algluiĝema bulo. Povas esti grasaĵo, sed ankaŭ manĝ-restaĵo. Li ĉirkaŭlekas siajn fingrojn. Estas manĝrestaĵo de pistitaj terpomoj kaj brasikrapoj.

Li nun devas kunporti iom por Riekie, alie ŝi perfidos lin. Dika Jan, la revulo, ekvidas nenion kaj sidas ankoraŭ en sia kaverno.

Riekie trovas la pecon de la manĝrestaĵo tre bongusta. Danke kaj ruze ŝi ridas kaj zorge ĉirkaŭviŝas sian buŝon per sia subjupo. Bartje kuras eksteren por serĉi la patrinojn. Ŝi estas sur la herbobedo kaj pendigas vindotukojn sur la sekigŝnuron.

„Panjo, ĉu vi ne havas ankoraŭ restaĵon da brasikrapoj?” Ŝi ne levas la okulojn.

„Kaj eĉ se mi havus, kio do?” ŝi demandas kun pinĉilo inter la lipoj.

„Ho, nenio, panjo. Sed, se mi hodiaŭ tagmeze ricevos tiun manĝrestaĵon, kieĉ bone mi tiukaze elserĉos tiujn fabojn!” Li streĉe atendas. Patrino ne povas ne ridi. Ŝi diras : „Ruzuleto!” Li havas bonan ŝancon.

„Ĉu panjo do faros tion?”

„Mi foje pripensos tion, ĉu ne?”

Ŝi ne tute diras, kion ŝi pensas. Bartje ne estas kontenta.

„Ĉu panjo faros tion, jes aŭ ne?”

„Ho jes, knabo, demandulo. Rapidu do, mi devas meti ilin sur la fornou.”

„Jes, panjo. Mi faros ĝin, kiom eble plej rapide!”

Dancante li eniras la domon, donas al Riekie sian rulŝtoneton kaj al Geertje sian fajroŝtonon, tiras Jan je la kolumo de sub la ŝrankolito kaj tiklas lin ĝis tiu serpentumas kaj singultas pro ridado. Tiam li aldonas al li klakantan baton sur la postajo, trenas seĝon al la tablo kaj diligente komencas elserĉi la putriĝintajn fabojn. Li jam fajfas pli bone ol hieraŭ; certege li iam lernos tion. Jam nun li ĝojas pro la vizaĝoj de la fratoj. Kiel rigardos ili, kiam nur li ricevos restaĵon de brasikrapoj!

La patrino envenas en la ĉambron, demetas sian longan antaŭtukon, malbutonumas sian robon kaj iras por preni la bebon. Kiel karesa kaj aminda ŝi montriĝas al Egbert. Ŝi lulas lin sur siaj brakoj kaj donas al li karesajn nomojn.

„Blateto! Mia kara bubo!... Etulo, porkidulo!... Trezoro de mia koro...” Ŝi klakas per la lango super li : tj-tj-tj-tj... kaj ankaŭ per la lipoj ŝi klakas kiel kampulo faras, se li plifervorigas sian ĉevalon. Ŝi ridas kaj kapsignas, sed Egbert ne ridas ankoraŭ. Ankaŭ kisojn ŝi donas al li sur lian ruĝan, sulkoplenan maljunul-vizaĝon. La suĉinfanoj tutcerte bezonas tion, ĉar Geertje nun nur tre malofte ricevas ilin, kaj la aliaj tute ne plu. Se oni povas marŝi, se oni jam ne estas la plej juna, tiam la tempo de kisoj kaj karesaj nomoj estas pasinta. Tiam oni estas bubo. Estas tiel, kaj certe estus strange, se estus alie.

Kiel blanka estas la patrino, kiun ŝi kun peno aperigas nun per siaj brunkoloraj manoj. Egbert ĝin kaptas per ambaŭ manetoj, kvazaŭ neniam li intencus ĝin ellasi. Li serĉas kaj palpas per siaj lipetoj kaj gruntas kiel malgranda porko. Tiam li silentas kaj trinkas, kaj rigardas al Bartje per siaj bluaj okuletoj. Bartje pro tio tute forgesas siajn fabojn.

La aliaj ankaŭ alproksimiĝas nun al la patrino. „Nia pupeto,” ili montras. „Nia pupeto trinkas”. Ili flustras tion, kvazaŭ ili dirus mallongan preĝon. Kviete ridetante, la patrino rigardas al Egbert. Kaj en ŝiaj okuloj estas la sama brilo kia de ĉi tiu mateno, kaj tamen, la suno ne brilas nun.

Estas feliĉe, ke Egbert venis. Panjo ĉiam estas multe pli afabla, kiam ŝi rigardis en liajn okuletojn. Tiam ŝi forgesas siajn zorgojn por momento. La zorgoj igas la patrinon malafabla kaj kelkfoje ruza. Sed nun ŝi diras tre aminde, ke Riekie prenu tiun lavopelvon

por plenigi ĝin : antaŭe per iom da malvarma kaj poste per iom da varma akvo el la kaldrono. Kaj Riekie nun ankoraŭ prenu tualetan tukon. „Kaj Bartje, vi devas ankaŭ fari ion por gajni la porvivon; prenu la grandan kaserolon por la faboj.”

Tion faras Bartje. Panjo sekigas la bebon, rekuŝigas ĝin en la ŝrankliton, metas la fabojn sur la fornĉon kaj iras por kaftrinki ĉe la najbarino.

La „kampo” provizore estas sendanĝera. Bartje trankvile povas kapti nun la dornfiŝetojn. La dika Jan rajtas kuniri por tenadi la poteton. Estas honoro por la dika Jan. Li estas ankoraŭ multe pli eta bubo ol Bartje.

* * *

Nun estas tagmeze. Ĉiuj sidas atendantaj antaŭ siaj malplenaj teleroj. La infanoj devas silenti. La patro havas siajn grandajn, interplektitajn, vilajn manojn sur la rando de la tablo kaj apogas laca per sia seĝapogilo kontraŭ la muro. Li odoras kiel sterko kaj ŝlimo. Li estas malkontenta, ĉar denove la patrino ne havis preta la manĝaĵon, kiam li venis hejmen. Li havas nur unu horetan da manĝotempo, kaj certe li devos malhavi sian kvaronhoran dormon sur la planko. La patrino iras tien kaj reen, kaj babilas, babilas, babilas... Ĉu ŝi subite reakordiĝis kun la patro? Aŭ ĉu ŝi provas pliafabligi lin? Ĉar fakte ŝi timas lin ĉiam. Kion la patrino pribabilas, tio ne penetras en la orelojn de Bartje. Li ne povis trovi ankoraŭ sian manĝrestaĵon. Kun fajrokolora kapo li sursidas, balanciĝante kaj turniĝante, sian seĝon. Estas nefirma, malnova senapogila seĝeto. Li nepre atentu, ke li ne rulfalu de ĝi.

Pum ! jen staras la kaserolo kun la brunaj faboj. Panjo malaperas malantaŭ la vaporo. Bartje nur vidas grandan lignan kuleron, kiu plenigas la telerojn. Meze en la nuboj parolas la patrino. Se la plenkreskuloj parolas, la junuloj devas silenti. Li ne povas diri eĉ unu vorton. Li balanciĝas, li flustras, sed la patrino ne rimarkas tion. Aŭ ĉu ŝi bone rimarkis? Kial do ŝi silentas?...

Kaj nun, la kulerego plena je vaporantaj brunaj faboj ŝvebas super lia telero. Restas nun ja nur unu rimedo por elsavi sin el tio. Li krias : „Ne mi!” Li fortiregas sian teleron kaj renversas la kuleron super la tablo.

La konversacio finiĝis. Dum momento estas tiel silente kiel en la preĝejo. Fatoplene kuntiriĝas la densaj brovoj de la patro.

„Diable!” li krias.

Oni aŭdas nur la tiktakon de la vekhorloĝo kvazaŭ ekforkuregantan ĉevalon : tik, rik-tik, rikke-tik, rik-ke-tik, rik-tik, tik... Kaj la spiregadon de Bartje. Kiel strange. Bartje ne povas plori. Li tute tremas. Liaj oreloj ardas. Preĝado... Li interplektis siajn manojn, la tremetantajn etajn manojn, kiuj estas malpuraj pro ŝtonetoj, kaj dorniŝetoj. Sed liaj okuloj malfermitaj. Liaj ardantaj okuloj vidas ĉion :

Sep kapojn, klinitajn malantaŭ malgrandaj, maldensaj, vapor-kolonoj. La patron, kiu troviĝas malantaŭ sia kaskedo. Gert kiu incite elŝovas sian langon. La varmiĝintan koleran vizaĝon de patrino kaj ŝiajn mallaŭte preĝantajn lipojn. Ili fendiĝis kaj formas nun buŝeton kiu ridaĉas al Bartje. Kaj „ili” vaporas. Bartje scias, ke ĉi tiun tagmezon li ne manĝos ilin.

La patro spirblovas; tio estas la signo, ke li finis la preĝadon. Li elmerĝas super sia kaskedo.

„Gert?” li diras.

„Sinjoro, benu ĉi tiun manĝaĵon, amen,” preĝas Gert.

„Arie?”

„Sinjoro, b-benu ĉi tiun manĝaĵon, a-a-men.”

„Bartje?”

Silentu...

Nun pli laŭte : „Bartje?”

Pli timiga silento...

„Sinjoro, benu...” komencas Riekie kun tremantaj lipoj.

Sed pli laŭte tremadas la voĉo de la patro : „Ne, silentu! Bartje devas preĝi. Diable, Bartje, preĝu!”

Kaj ankoraŭ ne eliĝas sono el la buŝo de Bartje. Ĉi tiu sidas rekte kun interplektitaj manoj, dum liaj okuloj rigardas senmove al lia telero. Bruas multe en lia kapo. Lia vizaĝo estas preskaŭ tiel ruĝa kiel liaj brulume dolorantaj oreloj. Estas stranga tago. El kio li ĉerpas la kuraĝon? La silento ĝenas. Baldaŭ la fulmotondro eksplodos. Timego kaj konsterniĝo vaporas el la faboj.

Ho, Bartje troviĝas en granda angoro. Li sentas ankaŭ naŭzon; li preskaŭ devas vomi. Sed interne de li estas io strange-neŝancelebla, kio estas pli forta ol ĉio ajn. Jen li sidas kaj ne povas agi alie. Li estas stulta, ĉar perforte oni neniam venkas plenkreskulojn. Sed malgraŭ tio, ke li estas konvinkita pri sia malvenko, li nepre devas malkaŝe ribeli.

Estas domaĝe, ke nun temas pri kaj kontraŭ la patro, ĉar la

patro kaj Bartje formas simetrian unuon. Kiam Bartje pripensas tion, li ne povas ne levi la okulojn.

Ili rigardas dum momento unu la alian : la granda kaj la eta viroj, vestitaj per la samaj bluaj kiteloj kaj kun la samaj brilegantaj okuloj. Danĝeraj ekbriloj salte moviĝas en tiuj okuloj, la vizaĝoj deformiĝas. Ankaŭ troviĝas petegado, silenta pledado de ambaŭ flankoj por ilia kamaradeco : Cedu do, kamaradeco!... Lasu do. La okuloj batalas kaj la konscio malklariĝas. Nun ektemas pri la patra potenco. Nun estas : fleksiĝi aŭ rompiĝi, eĉ se temas milfoje pri Bartje.

Jen oni aŭdas trembaton sur la tablon :

„Ĉu vi nun preĝos?...”

Io alia okazas ankoraŭ : kraketanta blasfemo. Bartje kuntiriĝas. Pro respekto li iĝas malvarme-rigida en sia interno. Sed Bartje jam ne estas plu Bartje. Li rigardas patrinon kaj glutas, glutas... kaj diras : „Mi ne preĝas por brunaj faboj.”

Kaj tiam, ĉio okazas tiel rapide. La patra seĝo flugas kontraŭ la muron. Bartje svingiĝas tra la aero. Liaj piedoj frapas teleron de la tablo. Riekie estas renversata. Ĉiuj ĝemploras. „Albert, atentu, temas pri infano!” „Paĉjo, ho ho, paĉjo!” Sed la patra, kalkovrita mano bategas la sidvangojn de Bartje. Kaj la ruza, trankvila Bartje aliĝas en malgrandan furiozulon. Li tretas, mordas kaj batas ĉirkaŭ si. Li krias : „Neniam, neniam, neniam!...”

Post tio, la patrino malfermas la pordon plenlarĝe, kaj la patro lin puŝas eksteren.

„Kaj la diablo vin prenu; se vi kuraĝus fari eĉ nur unu paŝon denove trans la sojlon!” kriegas spiregante la patro.

„Vi ja estas kiel sovaĝa besto!” krias la patrino. „Vi do serĉu nur alian hejmon. Tian obstinulon ni ne volas plu havi.”

„Tiel estas,” certigas la patro, surprizita de ĉi tiu nova vidpunkto. „Foriru do. Serĉu aliajn patron kaj patrinon. Kaj ne kuraĝu iam reveni ĉi tien!”

La pordo klakfermiĝas.

Tradukis Kr.

Al la nova jaro.

Mi esperas, ke ĉiuj legantoj en la nova jaro lernos kompreni la grandegan signifon de la nova „Tutmonda Movado” por ĉiuj homoj.

Forte propagandu la idealojn de Dr. Zamenhof en 1940.

La tempo estas matura por rikolti (vidu paĝ. 71).

LA KANTO DE LA JUNULAR!

Jun.ec-o estas ni.a flag' Espero ni.a fort' Frat.
 ec.a estas ni_a ag' Amik.a ni.a vort' Pac.a ni.a
 gvid.motiv' Por tuta ni.a far' Ni man'en man'en
 kolektiv' Kant.ante iras al la viv' Ni Jun.ular Tra
 kampo kaj arbar Ni Jun.ut.ar, Tra kampo
 kaj arbar.

II

Ridantaj lipoj : beltrezor',
 De vivoĝoj sen lim';
 En sana korpo, gaja kor'
 Kaj suno en l' anim',
 Dum en libera danc-motiv'
 Flirtadas la harar'.
 Ni man' en man, en kolektiv',
 Kantante iras al la viv',
 Ni, junular',
 Tra kampo kaj arbar',
 Ni, junular',
 Tra kampo kaj arbar'.

III

La ĝojo de ĉi nova tag',
 La belo de l' natur',
 Alvokas nin al la imag',
 De l' granda aventur',
 Al la brilega perspektiv'-
 De ni, la junular'.
 Ni man, en man', en kolektiv',
 Kantante iras al la viv',
 Ni, junular',
 Tra kampo kaj arbar',
 Ni, junular',
 Tra kampo kaj arbar'.

F. V. DORNO (1-8-39).

KARA MIA FILET'.

Pli gaja ol suno, pli bela ol flor',
 Pli ĉarma ol printempo, pli kara ol or',
 Ja estas vi, infanet'.
 Okuloj brilantaj, ridantaj al mi,
 Patrino karulo, infan' estas vi,
 Ho, kara mia filet'!
 Al panjo vi estas plej granda trezor'
 Vi sunradiet', mia ĝoj', mia glori,
 Ja estas vi, infanet'.
 Pli kara ol vi, al ni estas neni',
 Patrino karulo, infan' estas vi,
 Ho kara mia filet'!

Vin vartas patrino, plej dolĉa zorgat',
 Vin lulas, vin nutras, ĉar panjo amat'
 Ja estas vi, infanet'.
 Ekzistas ne hom' pli feliĉa ol mi,
 Ĉar dia donaco, infan' estas vi.
 Ho kara mia filet'.

„TUTMONDA MOVADO” POR ĈIUJ HOMOJ.

Karaj legantoj,

En antaŭa numero de „Nederlanda Esperantisto” mi legis gravan miskomprenon rilate al la novfondita movado en Tervuren (Belgujo). Ĝi tute ne estas Esperanto-organizo, sed tutmonda movado por ĉiuj homoj. Kaj fakte ĝi eĉ ne estas nova movado. Ni nur deziras daŭrigi la vivcelon de D-ro Zamenhof. Ĉiu esperantisto, kiu serioze studis „La Vivo de Zamenhof” aŭ „Originala Verkaro” scias, ke Zamenhof krom sia laboro por la Esp. movado ankaŭ laboris por alia tutmonda movado, en kiu li propagandis siajn privatajn idealojn kaj principojn. Multfoje li klopodis interesigi la esperantistojn por tiu movado, sed estis preskaŭ vana laboro, ĉar la tempo ne estis matura por tiaj idealoj. Eĉ antaŭ la Pariza kongreso (1914) ili faris ĉion por akiri fak-kunsidon pri la „Homaranismo” (tiel D-ro Zamenhof nomis sian idealon). Kiam tio ne sukcesis li klopodis aranĝi postkongreson. Sed intertempe la mondmilito eksplodis kaj li devis, dumvoje al la kongreso, forkuri hejmen. Tamen li persistis. Eĉ en decembro de la jaro 1916a li pensis pri la aranĝado de kunveno pri homaranismo en Svisio. Al ĝi li invitus profesorojn ekster kaj en la Esperanto-movado. Li pretigis cirkuleron, anoncante, ke la kunveno okazos en la lastaj tagoj de decembro 1916. Tamen la milito daŭris. Sur la manuskripto li poste trastrekis la daton kaj skribis ŝanĝe : „en la unuaj tagoj de aŭgusto 1917”. La milito daŭris. Denove li korektis la daton kaj skribis : „post la finiĝo de la milito”. Ĉu ne estas tragedie ?

Ĉijare en Tervuren, post 25 jaroj, finfine la esperantistoj fondis la movadon, al kiu D-ro Zamenhof sopiregis dum sia tuta vivo. Kaj eĉ nun ĝi naskiĝis kun multaj doloroj. Tamen, por disvastigi niajn idealojn ni nepre bezonas fortan kernon de esperantistoj, ĉar ĝi estas mondmovado kaj kiel unuigilon ni bezonas esperanton.

Por plene kompreni kaj propagandi „Tutmonda Movado” estas nepre necese, ke vi studu „La Vivo de Zamenhof”. La anoj de „T. M.” klopodas kompreni kaj respekti ĉies pensmanieron kaj ne ataki aliajn homojn, eĉ ne se oni atakas ilin. Momente ne estas eble multe pli diri pri la esenco de „T. M.”, tamen mi preferas, ke vi aŭdu la voĉon de D-ro Zamenhof mem. Pro tio mi kopios kelkajn partojn el „Originala Verkaro” kaj „Vivo de Zamenhof” pri ĉi tiu movado.

- I. (O. V.). La „Homaranismo” postulus la skribadon de multaj kaj grandegaj verkoj, kiuj pli aŭ malpli frue certe estos verkatoj de diversaj homaranoj. La temo estas tiel ampleksa, ke kiom ajn multe mi parolus, mi ne klarigus eĉ la centonon de tio, kio devas esti klarigata. Tial mi lasas al aliaj personoj la iom post ioman klarigadon.
- II. (O. V.). Mia projekto ne estos danĝera por la Esperanto-movado. Ho ne, ho ne! Mi estas certa, ke, se vi bone pripensos la aferon, vi venos al la konvinko, ke ambaŭ movadoj estas tre parencaj kaj nedisigeble ligitaj inter si. Same kiel la homaranismo ne povas sen lingvo neŭtrala, tiel same la ideo de lingvo neŭtrala neniam povos vere efektiviĝi sen homaranismo. Enradikiĝo de Esperanto ne estos iam ebla sen „Homaranismo”. Por Esperanto ni laborados same kiel antaŭe, kaj la „homaranismo” nin ne detenos.
- III. Kiel fundamentan leĝon de miaj principoj mi rigardas la regulon : „Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco”.
- IV. Neniam ni devas malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo estas alia ol nia.
- V. Lasante al ĉiuj homoj plenan liberecon havi tian internan kredon, kiu ŝajnas al li plej bona, ni proponas nur krei neŭtralan *, eksteran kadron, kiu povas etike, more kaj komunume unuiĝi ĉiuj memstare pensantaj homoj sendepende de tio, kiaj estas la filozofiaj, teologiaj kredoj de ĉiu el ili.
- VI. La veraj muroj inter la homoj estas nur la malsameco de la lingvoj, la relegiaj, politikaj, ekonomiaj kaj klasaj diferencoj.
- VII. La malamon en la mondo kaŭzas nur la ekzistado de premantoj kaj prematoj, la blinda egoismo, fiereco kaj kalumniameco. Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn el kiuj unuj rigardas la aliajn kiel rajtajn mastrojn super la aliaj.
- VIII. La celado de ĉiuj homoj devas esti krei harmonian homaron.
- IX. La persona iniciativo de ĉiu Esperantisto estas kaj restas tute kaj absolute libera. La homoj edukiĝos sur la bazo de neŭtrala lingvo, neŭtralaj moroj kaj neŭtrala etiko. Ĉiuj homoj kunfandiĝos en unu granda popolo de popoloj.
- X. En la estonto mi tute certe detenos min de ĉia partoprenado en la diskutoj, sekve tiuj, kiuj estas kontraŭ mia opinio havas plenan povon kontraŭbatali ĝin per ĉiuj fortoj.

Estas necese, pli ol iam, ke la principoj de D-ro Zamenhof estu konataj en la tuta mondo.

Mi jam parolis kelkfoje en intima rondo kaj naŭfoje en publikaj kunvenoj, kaj ĉie mi rikoltis entuziasmon.

Mi kuraĝas diri, ke ekzistas en la tuta mondo nur unu movado, kiu povas servi al ĉiuj homoj, kaj ĝi estas „Tutmonda Movado”, grandparte projektita kaj propagandita de D-ro Zamenhof jam antaŭ 40 jaroj.

Ĝi estas la sola movado, kiu povas detruiri la militon. Ni havas la taskon ankoraŭ pli neŭtraligi la ideojn por ke ĉiuj povu aliĝi al „T. M.” kaj por ke ni povu propagandi ĝin en ĉiuj landoj. Precipe la tutmonda junularo estas preta por konstrui novan mondon sur la idealoj de D-ro Zamenhof. Ĝi ricevis la plej belan, la plej fortan, la plej veran, kaj la plej sekuran idealon kiu iam naskiĝis. Ĉar ĝi estas bazita sur la amo por ĉiuj homoj.

Ĉion, kion la nova mondo bezonas : toleremon, amon, sincerecon, saĝon, donos la „Zamenhofismo”. La scienco, arto kaj literaturo vaste disvastiĝos tra la tuta mondo kaj kreos novajn eblecojn. Ni sentos nin iom post iom eta parteto de la tuta mondo kaj sentos nin respondecaj por la nuna mizerego.

D-ro Zamenhof donis al ni la praktikan solvon por interfratigi ĉiujn homojn, kaj per tio li solvis la hodiaŭan mondproblemon.

La junularo aliĝos al „T. M.”, ĉar ĝi estas tolerema kaj forte sopiras al egaleco, libereco, frateco kaj justeco. La scienculoj aliĝos al nia movado, ĉar ĝi estas tiom klara, kiom kristalo. La modesta kamparano sentos la simplan saĝon en ĝi. La patrinoj ne plu toleras, ke la milito detruas la fruktojn de ilia tuta vivo. La artistoj trovos novan inspiron por siaj verkoj. Kaj iom post iom la granda familio kreskos kaj la idealoj de D-ro Zamenhof enradiĝos en la animo de la tuta homaro.

Vaste malfermu viajn pordojn por „T. M.” kaj baldaŭ aliĝu! Sendu multajn demandojn kaj konsilojn pri „T. M.”. Evitu ĉiam diskutojn.

Mendu „La Vivo de Zamenhof” ĉe via libro-servo. Ankaŭ ekzistas eldonoj en la nederlanda kaj angla lingvoj.

„La Juna Vivo”, Limmen (Ned.). E. van Veenendaal-Bouwes.

* Neŭtrala = elstaranta super ĉio. (Ne miskomprenu ĉi tiun ideon de D-ro Zamenhof !!!)

Elprenu taŭgan parton el ĉi tiu letero kaj sendu ĝin tuj al viaj ĵurnaloj. Propagandcele ni presigis 3000 ekz. de supra artikolo. Petu kvanton da senpagaj ekzempleroj por sendi al viaj geamikoj.

LA BELIGA SALONO.

(Teatraĵeto en unu akto, prezentita en Tervuren, de la kimraj infanoj)

Personoj :

S.ro Tranĉeto, la posedanto de la salono.

Jakobo, helpanto.

Grafino Etuleto

S.ino Mangusto

Fino Preciza

} klientoj.

(La scenejo prezentas antaŭĉambron de la beliga salono.

Unu angulo estas apartigita per ekrano)

S.ro Tranĉeto : Jakobo, alportu la poton da ruĝumo. Ĉu eble, ke ĝi denove estas malplena ?

Jakobo : Ĝi estas absolute malplena, S.ro Tranĉeto. Vi metis la restaĵon sur la vangojn de S.ino Frago, lastan vendredon.

S.ro Tranĉeto : Jes, vere. Ho, posedi beligan salonon estas laciga afero. La plej multaj, kiuj venas ĉi tien por kuraco estas tiel malbelaj, ke oni devus unue senhăŭtigi ilin, antaŭ ol oni povas esperi plibeligi ilin.

Jakobo : Ĉu vi kredas, ke vi vere plibeligas ilin ?

S.ro Tr. : Kion vi celas ?

Jakobo : Ĉu ili vere estas pli belaj post via kuracado ?

S.ro Tr. : Ne, sed ili kredas, ke ili estas, kaj tio estas la plej grava parto. Ne gravas kiom malbela vi estas, se vi ne scias tion. Iu ajn povas konvinki sinjorinon ke ŝi estas bela.

Jakobo : Laŭ mi tio ne estas justa.

S.ro Tr. : Estas nur unu persono, kiun mi ne sukcesis konvinki, kaj tiu estas vi. Sed vi estas malbelega, kaj vi scias tion.

Jakobo : Jes, mi estas malbelega, sed estas eble beligi min.

S.ro Tr. : Kiel ?

Jakobo : Iam malbonega magiisto sorĉis min. Li tiom malbeligis miajn okulojn, ke nun mi devas porti ĉi tiujn okulvitrojn por kaŝi ilin; kaj li igis ĉi tiun malbelan hararon kreski sur mia vizaĝo. Sed li diris, ke estas unu kuracilo por mi.

S.ro Tr. : Ho, kaj kio estas tio ?

Jakobo : Tri sinjorinoj devas kisi min. Se unu post la alia faros tion, mia bela vizaĝo revenos.

S.ro Tr. : Hm, tio estas sufiĉe neprobabla. Neniu sinjorino volus kisi tian vizaĝon.

(Envenas Grafino Etuleto.)

S.ro Tr. : Envenu, sinjorino, kaj sidiĝu. Jakobo, senpolvigu tiun seĝon kaj alportu ĝin ĉi tien. Nu, sinjorino, kion mi povas fari por vi ? Plibonigi la okulharojn, tinkturi la harojn, kolorigi la vizaĝhaŭton, plibeligi la talion ?...

Grafino Etuleto : Ne, verdire mi deziras plibonigi mian nazon. Ĝi estas tiel stumpa. La knabaĉoj nomas min „stumpnazo”!

S.ro Tr. : Iom multekosta operacio ! Ni povas fari ĝin por vi, sed ne por malpli ol du funtoj.

Grafino E. : Tio estas granda sumo !

S.ro Tr. : Eble ni povus fari nazon por la duona prezo, tio estas, se vi ne malkonsentas pri lentugoj.

Grafino E. : Ho, mi ne ŝatus tion! Ne, jen la du funtoj. Donu al mi la plej bonan kvaliton.

S.ro Tr. : Dankon, S.ino. Ĉu mi rajtas demandi vian nomon?

Grafino E. : Grafino Etuleto.

S.ro Tr. : Dankon, via moŝto. Nun vi bonvolu eniri tiun ĉi ĉambreton (montras al la ekrano). Kaj mi faros mian miraklon.

Grafino E. : Ĝi ne doloros, ĉu ?

S.ro Tr. : Tute ne, via moŝto. Nur estas agrabla senteto, kvazaŭ vi dorso-antaŭen rajdus sur karuselo. Mi turnos turnilon, kaj ĉio estos farita! (Ŝi malaperas malantaŭ la ekrano).

Grafino E. : Ho, ho, ho! Vi turnas tro rapide!

S.ro Tr. : Jam bone, via moŝto! (Ŝi eliras kun ege longa nazo). Beleg - ege - ege granda pliboniĝo! Vi aspektas treege bele nun!

Grafino E. : Ĝi ŝajnas tre longa kaj malpeza! Ĉu mi povas ricevi spegulon?

S.ro Tr. : Ne - ne - ne. Nur sidiĝu trankvile sur ĉi tiun seĝon por kelkaj minutoj, por ke la ostoj firmiĝu. Ne movu vin, mi petas.

(Envenas S.ino Mangusto.)

S.ro Tr. : Bonan matenon, sinjorino. Kion mi povas fari por vi?

S.ino Mangusto : Mi deziras beligi mian hararon. Mia edzo nomas min „ratvosto”, kaj tion mi ne ŝatas.

S.ro Tr. : Via nomo, s.ino ?

S.ino M. : S.ino Mangusto.

S.ro Tr. : Dankon, S.ino. Ĉu vi preferas buklojn aŭ ondojn ?

S.ino M. : Kio estas pli multekosta? Mi ne povas elspezi multon. Kvinŝilingan, buklitan hararon, se vi tion havas.

S.ro Tr. : Bone, Jakobo, oleu la dentradon, kaj ŝanĝu la platon en la maŝino. Nu, S.ino Mangusto, vi bonvolu eniri la ĉambreton. (Ŝi malaperas post la ekrano.)

S.ino M. : Ĉesu, haltu, S.ro Tranceto! Vi tiras miajn harojn! Ho vi eltiras ilin, ho, ili ĉiuj elstaras!

S.ro Tr. : Ĉio estas bona, S.ino Mangusto. Vi nun elvenu! (Ŝi elvenas). Kia mirinda hararo! Grandega pliboniĝo!

S.ino M. : Ĉu mi nun estas belega?

S.ro Tr. : Treege ĉarma! Nun bonvolu trankvile eksidi sur ĉi tiun seĝon, por ke la novaj haroj firmiĝu.

S.ino M. : Ĉu mi povas havi spegulon?

S.ro Tr. : Pli poste, pli poste. Nur sidiĝu trankvile.

(Eniras F.ino Preciza.)

S.ro Tr. : Bonan matenon, F.ino. Kion mi povas fari por vi?

F.ino Preciza : Ho — mi ne multe ŝatas diri, — sed estas mia vizaĝkoloro... Mi estas tro pala... Mi deziras pli da koloro sur miaj vangoj.

S.ro Tr. : Jes, F.ino, vi estas iomete pala. Ni havas multajn belajn kolorojn, kiujn mi povas facile presi sur viajn vangojn : Karmezino, malnova rozo, rozo-ruĝeto, pomfloro, krem-ruĝeto...

F.ino P. : Pomfloro sonas bele. Tion mi deziras.

S.ro Tr. : Bone. Via nomo, mi petas ?

F.ino P. : Fraŭlino Preciza.

S.ro Tr. : Kostos dek ŝilingojn, **F.ino Preciza.** Jakobo, alportu al mi la skatolon da koloraĵoj (Jakobo alportas ĝin). Metu ĝin sub la ĉapon, kaj turnu ŝraubon „A”, kaj liberigu ŝraubon „B” (Jakobo iras malantaŭ la ekranon). Nu, **F.ino Preciza**, permesu al mi palpi vian pulson. Tute konstanta ! Bonege. Nun profunde enspiru. Bonvolu nun eniri la ĉambreton. (Si eniras).

F.ino Pr. : Ho, vi senhaŭtigas min ! Ne turnu tiel rapide ! Ho, miaj vangoj, Ho, mia kompatinda haŭto !

S.ro Tr. : Tute bone, **F.ino.** Ne pensu, kaj vi sentos ion ajn. Nur unu lasta turno... Vi povas elveni, nun. (Si elvenas).

Belege, grandega pliboniĝo. Nun vi sidiĝu sur tiun seĝon, por ke la nova koloro solidiĝu.

F.ino Pr. : Mi ŝatus vidi en spegulo.

S.ro Tr. : Pli poste, pli poste, kara fraŭlino. (Li eliras).

Grafino Euleto : Kia terura hararaĉo !

S.ino : **Mangusto** : Kia malbelega vizaĝkoloro !

F.ino Preciza : Kia aĉa nazo !

Ĉiuj : Kion vi celas ?

Grafino E. : Ĉu eble, ke tiu viro friponis min ? Kia estas mia nazo ?

S.ino M. : Helruĝa, kaj treege longa ! Kia estas mia hararo ?

F.ino P. : Kiel rubusujo ! Kia estas mia vizaĝkoloro ?

Grafino E. : Kiel bolita rabarbo. (S.ro Tranĉeto envenas).

S.ro Tr. : Mi tre bedaŭras, **S.inoj.** io en la maŝino malordiĝis, sed ne gravas !

La nazo malpliĝos post kelkaj jaroj, la haroj, malaperos en la maljuneco, kaj la tempo iomete malheligos la vizaĝkoloron !

Grafino E. : Trompisto !

S.ino M. : Kanajlo !

F.ino P. : Fripono ! (S.ro Tranĉeto elkuras).

Grafino E. : Ni ne povas sekvi lin. Venos aro da knabaĉoj post ni, se ni nun kuraĝos eliri ! (Al Jakobo) : He, vi ! Alportu al mi spegulon, tuj ! (Li faras. Ĉiu sin rigardas kaj koleriĝas).

F.ino P. : Ili ne rekonos min hejme, se mi reiros !

Ĉiuj : Kion ni faru ?

Jakobo : Se vi permesas, mi kredas, ke mi povas helpi vin, sinjorinoj. Mi scias, kiel funkciigi la maŝinon, tiel ke ĝi redonos al vi viajn belaspektojn.

Grafino E. : Ho dankon ! Vi certe ne estas plaĉa ulo, sed mi donos al vi dudek funtojn, se vi povas fari tion !

S.ino M. : Mi donos al vi kvin funtojn !

F.ino P. : Kaj ankaŭ mi !

Jakobo : Ne, sinjorinoj, mi ne deziras vian monon. Mi bezonas alian rekompencan.

Grafino E. : Mi donos ion ajn en la mondo !

Jakobo : Post kiam mi kuracis vin, mi deziras, ke vi ĉiuj donu al mi kison.

Grafino E. : Mi svenus !

S.ino M. : Mi preferus morti !

F.ino P. : Mi tute ne povus!

Grafino E. : Ĉu nenio alia sufiĉas?

Jakobo : Nenio alia.

Grafino E. : Do, mi konsentas.

S.ino M. : Kaj mi.

F.ino P. : Kaj mi.

Jakobo : Nu, via moŝto, eniru la ĉambreton. (Ili laŭvice eniras, kaj elvenas kun ordinaraj vizaĝoj).

Grafino E. : Ni saviĝis! Kiel vi sukcesis?

Jakobo : Mi turnis la turnilon en la kontraŭan direkton kaj kaŭzis, ke la maŝino funkciis malantaŭen. Nun mi eniros, kaj vi unuope envenu kaj pagu al mi.

Grafino E. : Vi iru unue!

S.ino M. : Ne, vi.

F.ino P. : Mi eniros, kaj pagos, antaŭ ol mi malsaniĝos pro la devo, kisi tiun monstron! (Unu post la alia eniras kaj revenas).

Jakobo (elvenas, sen okulvitroj, kun ordinara vizaĝo) : Dankon, sinjorinoj! Vi rompis la sorĉopovon de malbona magiisto. Nun mi denove aspektas kiel aliaj homoj, kaj mi forlasos la beligan salonon de S.ro Tranĉeto. Li estis unuagrada fripono, kaj mi ĝojas forlasi lin!

F.ino P. : Li prenis nian monon, sed li ne donis al ni belecon.

Jakobo : Sed, tio estas tute ne necesa, sinjorinoj!!!

Grava novaĵo por la violon-artistoj.

Post longa esplorado la violonartisto S.ro Ridderhof en Heerlen (Nederlando) sukcesis trovi la procedon, laŭ kiu Stradivarius konstruis violonojn. Ĉiu violono, konstruita same kiel la Stradivarius violonoj, havas, kiam ĝi estas ankoraŭ nelakita, la saman sonon, kiel la veraj Stradivarius-violonoj. Nur post kiam ĝi estas lakita la belsono estas for. Ĝia sono nebuliĝas aŭ akriĝas, kaj daŭras jarojn, antaŭ ol la violono reakiras la belsonon, kiun ĝi havis antaŭ la lakado. Nur Stradivarius sciis la sekreton de tiaj lako, kaj liaj violonoj havis la ĝustan sonon, ĉu lakitaj ĉu nelakitaj. S.ro Ridderhof ankaŭ malkovris, ke la malnovaj, italaj majstroj ne tiel lakis la violonojn, kiel oni nuntempe lakas ilin.

S.ro Heinberg el Liège (Belgujo) diras pri la eltrovo de S.ro Ridderhof : „La plej bona eltrovo en la violonarto de post du jarcentoj”. Same parolas S.ro Prof. Hennen, la direktoro de la Heerlena muziklernejo, kaj antaŭa soludisto de la Antverpena Opera Orkestro.

Ili estas entuziasmaj pri la eksterordinara kvalito kaj belsono de liaj instrumentoj, kiuj, kvankam novaj, sonas kiel la malnovaj violonoj de Stradivarius.

Kiu deziras prui la violonojn, estas bonvena ĉe : S.ro Ridderhof, Meezenbroek, Heerlen (Ned.).

AFABLA PETO !!

Ni urĝe petas niajn abonantojn, kies abono finiĝas je 1 januaro, ke ili kiom eble plej baldaŭ pagu sian kotizon por la jaro 1940a. (Sur la kovertojn de tiuj, kies abono finiĝos je la supra dato, ni metis la ŝtampon : 1 Januaro '40).

LA JUNA VIVO EN "LA JUNA VIVO".

...Ja estas bedaŭrindege, ke okazas milito ĝuste kiam nia afero tiel bone progresas. La junularo en multaj landoj ĵus komencis kompreni la signifon kaj neceson de internacia lingvo, kaj per praktika aplikado de la lingvo en la junularkunvenoj ili komprenis la ĝojon kaj amikecon de libera parolado kun gejunuloj diverslandaj. Ni esperu, ke la milito ne detruos tiun komprenemon, kaj ke poste, kiam denove la Paco regos sur la tero, la beno de internacia lingvo ricevos la rekonon de ĉiuj popoloj.

Vi skribis, ke la filmo pri Tervuren estas pli bela ol tiu de Groet. Se estos eble por ni ricevi kopion, mi kun grandega eksciteco atentos ĝian alvenon. Ja estos bele denove vidi konatulojn, eĉ se nur sur film-rubando, kaj denove ekkapti la ĝojon kaj entuziasmon de revido de junularkunveno. Tamen, se la filmo ne povos esti ricevota, mi akiros la Groetan filmon kaj denove revidos tiujn neforgeseblajn scenojn el pasinta tempo. La revo, kiu fariĝis realo en Groet, ĉiam komunikas al mi tiom da nepriskribebla korsento, ke mi estas preta post ĉiu rememorigo, kontraŭstari ĉiun bategon de la vivo, ĉar mi scias, ke mi vidis la komencon de nedetruenda epoko en la historio de la homaro. La vojo jam estas klare prezentita; la solvo de la problemo jam estas trovita. La nura neceso nun estas la tempo, kaj la tempo ne konas limojn. Ni povas atendi trankvile la alvenon de la nova epoko; nenio ajn nun povas reteni ĝin. Ni konservu la ĝojon en la koro; la optimismo ĉiam restu kun ni; pacienco ni atendu, ĉar kiel ni kantis en la Groeta kunveno „Junaj ni estas, fortaj ni estas, la estontec' apartenas al ni”.

Leighton-Buzzard (Angl.).

John W. Holland.

...Kun granda plezuro mi ĉiam legas vian gazeton. Precipe plaĉas al mi la rubriko „La Juna Vivo en La Juna Vivo”, en kiu miaj geamikoj esprimas siajn opiniojn, spertojn, kaj travivaĵojn, ofte tre interesajn. Ekzemple mi tre avide, kaj eĉ envie, legis artikolon verkita de iu francino, kiu renkonte iras al sia nederlanda korespondanto. Mi pensas, ke tio okazis antaŭ la kongreso en Groet. — Ho, kiom pli feliĉa estas vi ol mi, mia nekonata franca samideanino! Ĉu ankaŭ mia deziro iam plenumiĝos? Ĉu ankaŭ mi iam povos partopreni vian junularkunvenon, kaj ĝui tie nian lingvon kun samideanino? Antaŭ unu jaro mi ankoraŭ ne sciis Esperanton, kaj nun, kiam mi ĝin ellernis...

Sed mi firme esperas, ke „venos tempo sopirata” kaj ni atingos nian celon elrevenante. — Sed venu jam baldaŭ tiu feliĉega momento, kiu certe ne estos feliĉa sole por mi.

Via 16-jara ĉeha amiko de T.J.O. (adreso en No 2-3)

Ni ne ĉesu !

Estas sabato, kaj por mi longa labortago. Mi estas en melankolia humoro. Ne pro la farota laboro! Ne pro la vetero, ĉar ĝi estas belega. La suno jam komencis verŝi siajn radiojn sur la teron. Rigardante dekstren mi vidas verdajn herbejojn kun paŝtigantaj bovinoj. Ĉio ĉirkaŭ mi elspiras trankvilecon, pacon. Sed en mi ne estas trankvilo, tute ne! En mi estas timo, daŭra, nervostreĉa timo! Pro kio? Estas pro la minacanta milito, tiu milito, kiu postulos milojn da vivoj! Vivojn de junaj filoj, de patroj... de patrinoj, infanoj kaj grizuloj...

Tiun timon mi havas, ĉar hodiaŭ, aŭ morgaŭ, aŭ eble postmorgaŭ, sanaj viroj devos iri al la batalejoj por murdi homojn el aliaj landoj, senkulpaĵoj, nekonatajn homojn; baldaŭ pilotoj eniros la flugmaŝinojn por ĵeti bombojn sur la teron, por trafi kiom eble plej multe da domoj, por mortigi kaj kripligi kiel eble plej multe da homoj!

Estas tagmeze, kvaronon horon antaŭ la unua. Kun streĉita atento la familio sidas en la loĝĉambro por aŭskulti la mondnovaĵojn per la radio-aparato. Ĉu la paco ankoraŭ povas esti savata? Ĉu la mondregantoj aŭskultos al la voĉo de siaj konsciencoj aŭ ĉu la voko al mono kaj posedaĵoj estas pli laŭta?

Aŭdiĝas la voĉo de la oficisto de la A. N. P., kiu komunikas...

La germanaj trupoj jam envadis en Polujon kaj bombardis militajn konstruaĵojn... Terure, do nun estas certe, ke komenciĝis la infera danco? Ho, ankoraŭ ne por ni holandanoj, sed ĉu estas malpli terure, ke sangas homoj el aliaj landoj? Ĥi same kiel ni abomenas la militon! Kiu ne abomenus ĝin?

Kaj tiel komenciĝis unu el la plej teruraj okazaĵoj : la milito... Multaj semajnoj pasis post tiu fatala tago, kaj la milito daŭre furiozas. Kiom da vidvinoj ĝi jam faris, kiom da orfoj; kiom da vivoj ĝi jam detruis, korpe kaj spirite?

...Estas festo en la vilaĝo : anoncis sin nova mondano, nova vivo estiĝis. Ĉiu ĝojas, ĉiu sentas sin gaja kun la feliĉaj gepatroj. Ĉiu alvenas kun surprizoj por la nova hometo. Ĉu ne okazis tie plej bela miraklo?

Kaj en trankvila momento mi meditas pri tio kaj pensas : „Por kio tiu nova vivo kreĝis? Ĉu... por esti murdata per kuglo, per gaso, bombo aŭ io simila? Kiu scias!

Sed ne, tiel mi ne rajtas pensi. Tiel precipe la esperantistoj ne rajtas pensi! Nun furiozas milito plej kruela. Sed tiel ne povas resti! Por tio zorgu ni, geesperantistoj! Ni ne perdu la kuraĝon kaj la esperon, sed ni daŭrigu la batalon por la plej sankta celo : Paco! Ne plu diru : Mi ne havas tempon por okupi min pri Esperanto! Ni ne pensu : „ Ho, jen venis milito, nun nia laboro estis vana!” Ĉar tio ne estas vera. Nia bela laboro neniam estas vana. Ni nur devas zorgi, ke venu pli multe da pabatalantoj, por ke la milito fariĝu nebla! Por ke ne plu estu eble, ke homoj estas buĉataj de homoj!

Ni laboru por la estonto, kaj


Paŝon post paŝo, post longa laboro,
Ni atingos la celon en ĝloro!

Koedijk (Nederlando).

Iu pacamantino.

Estis bonege ricevi la lastan numeron de „L. J. V.” antaŭ kelkaj tagoj. Ĝi kvazaŭ estis oazo en la dezerto, ĉe kiu vi povas denove ricevi la forton kaj iri sur nia vojo multe refreŝigita. Nia entuziasmo por nia idealo ne povas manki dum ni daŭre ricevas „La Juna Vivo” !

John Holland.



ligotubero. (ligilo)
konforma al la realo
leĝaro
senrezulte
sentosidejo
laks-igilo
mara herbo
meritanta ion
hebreido
korp parto

En la nigre kadritaj kvadratoj venas la nomo de apudmara lando, tre favora al esperanto.

T. Sv. Martin (Ĉ.S.R.)

D. Vojo.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos du premiojn. Ni atendos solvojn ĝis 15 januaro '40.

La solvo el No 2-3.

1. memoro.

2. neofta.

La premiojn gajnis : Jannie Bliet, Wemeldinge (Ned.); S.ro E. Le Coze, Lorient (Franc.).

Por komencantoj.**Aŭtuno.**

Blovas forta vento! Ofte pluvas, aŭ... pluvegas. Malagrabla vetero! Sur la stratoj kuŝas la arbfolioj, kiuj bruniĝis kaj malsekiĝis.

Grandaj grizaj nuboj estas sur la ĉielo; griziĝis la ĉielo super la tuta mondo!

En tiu ĉi sezono la naturo ŝajne mortas. Sed, interne, restas ankoraŭ iom da vivo : en trunkoj, branĉoj kaj burĝonoj kaj en la tero. Post la kruda aŭtuno kaj la malvarma vintro ni vidos, ke la naturo ne tute mortis. Ĉie estos novaj plantoj, folioj kaj floroj.

Post la malhelaj milito-tagoj ni vidos, ke la homaro ankoraŭ ne tute mortis, kvankam tiel ŝajnas. Interne restas kelke da „lumetoj”; ili estas nia espero por la „printempo de la homaro”.

M. v. E.

Vasta rigardo.

Du junaj turistoj el Usono aŭtomobile vizitis Skotlandon. Ili haltis en izolita loko, kiu kuŝis tre alte. Tie estis maljuna ŝafisto kun sia ŝafaro. Unu el la turistoj ŝerce diris : „De ĉi tie vi povas multe vidi!”

„Jes,” respondis la paŝtisto, „ni havas vastan elrigardon.”

„Mi kredas, ke vi eĉ Usonon povas vidi!” diris la alia, kaj li mokridis.

„Ni povas rigardi pli malproksimen ol ĝis Usono,” respondis la maljunulo.

„Ĝis kie vi povas vidi?”

„Ni povas vidi la lunon,” diris la ŝafisto, kaj kviete li bruligis sian pipon.

La aliaj silentis...

(Parizo.)

Lechelle.

Vintro.

Venas la vintro, kaj kun ĝi la longaj mallumoj de la malvarmaj noktoj. Kion fari en la tempo de vintraj vesperoj? Por vere entuziasmaj Esperantistoj tiu problemo estas facila. Ĉu oni ne plej feliĉe vivas en Esperantujo dum ĉi tiuj vesperoj?

En multaj lokoj okazas la vesperaj kursoj por la novaj Esperantistoj, sed por la pli spertaj ekzistas granda kampo, en kiu ili povas promeni kun plezuro kaj eĉ kun ĝojo. La Esperantaj literaturaj floroj estas multaj kaj tre belaj. Ĉiu legema persono trovos ion laŭ

sia gusto inter la multaj libroj. Komparo inter la stiloj de la diversaj aŭtoroj estas interesa. Tre interesa estas la komparo inter la originala kaj traduka literaturo en Esperanto.

Je nia bedaŭro ni ne povas enpresigi ĉiŝojn multajn simplajn rakontojn, tamen en la febr. numero aperos duobla porcio.

Respondoj al Amikoj (1889).

Al S.ro M-n. en G. — Via letero estas subskribita : „Unu el la plej varmaj amikoj de la lingvo Esperanto"! Mi efektive memoras, ke de tempo al tempo vi sendas al mi leterojn kun demandoj pri la irado de la afero; sed neniam ankoraŭ vi skribis al mi kion vi mem faris por nia afero. Varma amiko de nia afero povas sin nomi ne tiu kiu ĉiam demandas, sed nur tiu kiu laboras por nia afero kaj vastigas ĝin. Anstataŭ demandi min ĉiumonate „kio estas farita", vi devas en la fino de ĉiu monato demandi vin men : „kion mi faris por nia afero en la pasinta monato?"

Al S.ro R. en Moskvo. — Sinjoro B. estante ankoraŭ en Varsovio havis ĉiam la kutimon, paroladi „ni laboris", „ni faris", k c. Sed efektive li absolute nenion ankoraŭ faris, li ne alportis eĉ unu novan amikon al nia afero, kaj eĉ sian propran „promeson" li ankoraŭ ne alsendis. Mi ripetas, ke ĉiu, kiu ne faras al si en la fino de ĉiu monato la demandon „kiom da novaj amikoj mi alportis al la afero", tiu ne povas sin nomi amiko-laboranto de nia afero, se li eĉ tute bone povas ellerni la lingvon.

D-ro Zamenhof „Originala Verkaro".

Helpo !

Kun granda ĝojo ni denove ricevis abonpagojn por eksterlandaj amikoj : S.ro Spaanenburch, Vissersdijk 29, Enkhuizen, Ned. : f 2; F.ino v. Vliet, v. Boetselaerstraat 45, Alphen a. d. Rijn (Ned.) : f 1,60. Plue Wim kaj Dina v. d. Hoff en West-Graafthijk havis 2 abonojn, el kiuj ili unu donacas al eksterlandano, kaj same faris Alie kaj Dick Broekhuis en West-Graafthijk. Ni do povas sendi la gazeton al 6 amikoj : Ludoviko Zamenhof en Varsovio, Polujo; S.ro Sygnarski, Bydgoszcz, Polujo; S.ro Ostrowsky en Germanio; Malsanula grupo „Norda Stelo", Sanatorio Gelfa-Minho, Portugalujo; Proslav M. Filipovic, Korsman, Kragujevac, Jugoslavujo; osefo Marti Sanes, Str. V. Martinolas 23, Rosas, Hispanujo. Krome ni senpage sendas la gazeton al S.ro Golobič, Ljubljana, Jugoslavio; Justo Estan, Calossa de Segura, Hispanujo. S.ro Hottinga, Primulastr. 8, Amersfoort pagis por sia amiko, S.ro Rozentals en Estonio.

Sekvu la bonan ekzemplon !!



tio komunikoj

Tutmonda Junularorganizo.

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Ĝiro 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Koedijk (N.H.). Ĝiro 310334.

Red. „La Peranto“ kaj „De Esperantist“ : Meent 35, Leerdam, Ned.

En ĉiuj medioj sentiĝas la sekvoj de la milito, kiu denove trafas la mondon. Precipe humanisma movado, kia nia, forte suferas sub la nuna mondsituacio. Tamen la plej granda parto de niaj membroj ankoraŭ ne rekte estas ĝenata de la milito, kaj al ili estas la devo zorgi, ke nia organizo malgraŭ ĉio povas resti sur la atingita nivelo. Ni scias, ke tio estas malfacila tasko, sed per ĉies helpo tio certe sukcesos al ni. Unu el la aferoj, kiuj ĝuste nun postulas nian specialan atenton, estas nia holandlingva propagand-organo „De Esperantist“. Pro la mobilizado en Nederlando ni perdis multajn kolportantojn; sekve la vendo-kvanto malpliĝis. Ni zorgu tamen, ke ni povu daŭrigi la eldonadon de la gazeto laŭ la kutima maniero. Ni fidus por tio je ĉies kunlaboro. Se vi jam estas kolportanto : faru vian eblon por pligrandigi la vendo-kvanton! Se vi ankoraŭ ne vendas, aŭ eble eĉ ankoraŭ ne konas la gazeton : Mendu ĝin aŭ petu senpagan specimenon al la redakcio, Meent 35, Leerdam. Pli ol iam ni bezonas gazeton, kiu vekas en la homoj amon al la homaro kaj kredon en la Zamenhofa Idealo.

Kotizo : Ni afable petas al tiuj membroj, kies membreco finiĝas je la 31-a de decembro, ke ili pagu sian kotizon kiel eble plej baldaŭ al la kasisto S.ro M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam, ĝironumero 330139. Tiel vi evitas por ni multan superfluan administradon. Kiel kvitancon oni ricevos kotizmarkon, kiun oni gluu sur la membro-ateston.

Grupoj! Ĉu vi jam komencis la aranĝojn por niaj kunvenoj en 1940? Se ne, tiam ne plu prokrastu! Se ni pro la mondsituacio ne povos aranĝi internacian junularkunvenon, tiam ni certe okazigos landajn aŭ regionajn kunvenojn, do antaŭpreparu vin!

Donacetoj : S. B. en Hymert : guld. 0,35.

Adressanĝigoj : Nova adreso de nia perantino en Francujo : F.ino M. Montagnon, Instruistino, Ecole de Filles, Evillers (Doubs).

Pro la internaciaj cirkonstancoj nia peranto en Anglujo, S.ro Holland, provizore ne povos plenumi sian taskon. Lin antaŭstataŭos : F.ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Neath, Glam.

Infankursoj : Malgraŭ la malfacilaĵoj ni fondis en jenaj lokoj infankursoj : Bakkum, Limmen, West-Grafdijk, Amsterdam, Arnhem, Krommeniedijk, Heveadorp, Leeuwarden. Entute 193 lernantoj. Ankaŭ S.ro Morcombe, Birminkam (Angl.) kaj F.no Rees el Kimrujo skribis tre optimisme pri la junularlaboro. En multaj lokoj oni daŭrigas la kursojn de la antaŭaj jaroj. Ni ĉiuj persistu!

Korekto : En la kolportad-gazeto de T. J. O., „De Esperantist“, erare staris, ke la membro-kotizo de simpatiantoj en Nederlando estas guld. 1,40. Tio devas esti : guld. 0,40.

Subtenu la junular-movadon, mendu viajn librojn ĉe „La Juna Vivo“ ! Ni volonte sendas senpagajn libro-listojn.

KORESPONDADRESOJ

Anglio : Kiu instruisto deziras grupkorespondadon inter siaj klasanoj kaj miaj? Aĝo : 15-19 j. Unujara, dujara kaj trijara lernado. Adr. S.ro H. Morcombe, 30 Beech Rd., Bourneville, Birmingham.

Kimrujo (Britujo) : 20 gekursanoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. certa. S.ro H. C. Hancock, 16 Alexandra Terrace, Brunmill, Swansea.

Nederlando : Kiu sendas al mi I. P. pri ventmuelejo, ricevos belan muelejkarton. (Ank. al Ned.anoj). E. v. Walsum, Fop-Smitstr. F 10, Alblasserdam.

Nederlando : Frizisto D. Vuisst, p/a A. Wierda, Doolhof, Oldeboorn (Fr.), dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

Nederlando : 45 gelernantoj, 12-15 jaraj, dez. korespondi. Adreso : S.ino M. C. Strasser-Melis, Soendastr. 27, Leeuwarden (Fr.).

Nederlando : Junulo, 18-jara, dez. kor. letere kun ĉiuj landoj. Respondo certa. T. Vrielink, Boshweg K 5, 't Zand (N. H.).

Nederlando : Mi dez. interŝ. pm., kaj koresp. kun gejunuloj en ĉiu lando. F.ino I. Kuperus, Berlikum (Fr.).

Portugalujo : 26-jara fraŭlo dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Resp. certa. José Guerreiri Godinho, Algares, Aljustrel.

Nederlando : La infangrupo en West-Graafthijk (11-15 j.) deziras korespondi kun geamikoj en la tuta mondo. Adr. : F.ino N. Kool, West-Graafthijk (N. N.).

Nederlando : Dez. kor. F.ino Maria Joosten (20-j.), Vlasven 148, Blerick (L), kun gejunuloj el ĉiuj mondpartoj. Respondo certa.

Nederlando : Dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, S.ro H. Velthuyzen, Esperanto-Instruisto, Transvaalstr. 64, Rotterdam-Z.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

KALENDARO POR 1940. Okaze de Kristnasko aŭ Novjaro sendu viajn bondezirojn per Kalendara Poŝtkarto por 1940. Klaregebla, dukolora presita sur bona kartono, ĝi estas ŝatata donaco, kiun la ricevinto volonte uzos tutan jaron. Prezo : Aŝrankite, 20 ekz. por hgld. 0,44; 100 ekz. por ghld. 1,76. Specimene 5 ekz. por hgld. 0,125 aŭ 1 resp. kup. Eldonejo HEO, Abcoude, Holando, Poŝtkonto 88015.

SENPAGA ESPERANTO-LITERATURO. La legantoj, kiuj sendas 40 uzi-tajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos senpage novan, interesan libron, je valoro de 5 b. tr. Adr. : Van Doren, Langstr. 40, Borgerhout, Belgujo.